

Jens Stengård Larsen

La truoj de Otto Jespersen (1860-1943)

0. Enkonduko

Se oni volas kompreni la rolon kiun ludis Otto Jespersen en la historio de planlingvoj, la unua kion oni faros estas konsulti lian Danlingvan membiografion (Jespersen 1938b) kaj ĝian Anglan tradukon (Jespersen 1995), kiu enhavas amason da klarigaj notoj kaj plenan bibliografion de liaj verkoj. La membiografio enhavas du tutajn ĉapitrojn (la 9-an kaj la 14-an) titolitajn “Internacia lingvo” – unu pri antaŭ, kaj dua pri post la unua mondmilito. En ili estas menciitaj ne malpli ol 15 internaciaj lingvistoj favoraj al internacia planlingvo: Bréal, Ellis, Schuchardt, Meillet, Baudouin de Courtenay, Monseur, Collinson, Uhlenbeck, Thalbitzer, Hermann, Karcevskij, Funke, Debrunner, Bally kaj Sechehaye. Tio estas sufiĉe impona nombro, kvankam la nomoj havas tre diversan pezon.

Tamen, tiuj du ĉapitroj estas nur mallongigo de la artikolego “Mia laboro por internacia lingvo” (Jespersen 1937; 1938a), kiu aperis en Novialo pli-malpli samtempe kun la membiografio. Tie Jespersen mencias unu kolegon kiu estis kontraŭ la ideo de planlingvo, do, tio estas “truo” en la membiografio. Sed ankaŭ en la plena Noviala teksto estas ne malpli ol kvin truoj: nenomitaj estas kvin homoj kiuj tutcerte havis konsiderindan, parte eĉ decidan influon al la laboro de Jespersen pri internacia lingvo. Se ni prenos la entute ses truojn kronologie, la unua estos Rasmus Rask.

1. Rasmus Rask (1787-1832)

Ĝis hodiaŭ, la regulo estis ke ĉiu iom grava Dana lingvisto devas presigi ion pri Rasmus Rask, kaj ankaŭ Jespersen (1918) liveris biografieton. Antaŭ tio, la Dana esperantisto Peter Zoffmann malkovris ke inter la postlasitaj notoj de Rasmus Rask ankaŭ estis skizo de planlingvo, kaj tion li kompreneble tuj raportis al la Esperanto-gazetaro (Zoffmann 1916; 1917). Sed nenie en la tuta verkaro de Jespersen estas indiko ke li sciis ion ajn pri tio.

Tio estas treege mistera. Bone, eble en 1918 la rilatoj inter la Esperantomovado kaj Otto Jespersen estis tiaj ke unu ne legis la alian. Sed en la Rask-biografieto Jespersen (1918:80) dankas al la bibliotekisto Carl Petersen, tiel ke estas tre malfacile kredi ke li havis aliron nur al la presitaj verkoj de Rask, kaj ne al la manuskriptoj. Ni do iom ekzameni la manuskriptojn de Rask.

Siajn pensojn pri internacia lingvo Rasmus Rask evoluigis kadre de granda vojaĝo al la nunaj teritorioj de Barato kaj Srilanko, kiu daŭris de 1816 ĝis 1823.¹ Unue li iris al Stokholmo kaj Sankt-Peterburgo. Jam en Svedio li pensis ke lia laboro estus multe pli facila se li disponus komunan alfabeton por ĉiuj lingvoj. Tiutempe oni multe parolis pri pazigrafioj², kaj tute nature Rask venis al la penso ĉu ne ankaŭ komuna lingvo estus ebla.

Unue Rask estis skeptika pri la ideo de komuna skribo kaj tute ne ŝatis tiun de komuna lingvo. De sia infanaĝo li tre ŝatis la Grekan, kaj survoje en Svedio li devis lerni la Rusan. Do, nature venis en lian kapon ke povus esti interese vidi ĉu eblas skribi la Rusan lingvon per la Grekaj literoj. Pri ĉi tiu tuta temaro li skribis Germanlingvan artikolon, titolitan “Kiamaniere oni povas skribi la Rusan lingvon per Grekaj literoj, kun aldono de eseo pri pazigrafio” (Rask R.1816).

Ĉi tiu artikolo bedaŭrinde neniam estis presita. Rask sendis ĝin al la historiisto Phillip Krug en Sankt-Peterburgo kaj demandis ĉu ĝi estas publikiginda. Krug opiniis ke ne, kaj Rask sekvis tiun konsilon, do ĝis hodiaŭ ekzistas nur la manuskripto (Bjerrum 1968:548-549; Rask R.1832:1816.11.13-20). La leteroj inter Rask kaj Krug ne estas konservitaj, do ni ne scias per kiaj argumentoj Krug konvinkis Rask.

La interesa afero pri la manuskripto Rask R.(1816) estas, ke kvankam li opiniis komunan lingvon tute malebla, li ne hezitas konsili kiel oni tamen devus fari ĝin:

*Anstataŭe oni devus komenci kun la plej konataj vortoj de ĉiuj nacioj (ekzemple biblio, filozofio, rabeno, korano, safrano k.s.), uzi iliajn radikojn kiel fundamenton kaj kunmeti ilin laŭ la plej simplaj reguloj, kiel en la Kreola lingvo aŭ Lingvafranko, t.e. sen vera fleksio, tiel ke estus nenio nova en la materio kaj nenio fremda en la formo.*³

En Sankt-Peterburgo Rask tamen spertis la malbenon de Babelo. Iam en unu sama tago li devis paroli ses malsamajn lingvojn, kaj tio estis iom multe eĉ por li, kiu estis tre lingvolerta (Rask K.2002:119). En Sankt-Peterburgo li do komencis ellabori universalan skribon kaj universalan lingvon (Rask R.1823), kaj de tempo al tempo li revenis al tiu laboro dum la tuta multjara vojaĝo.⁴ Reveninte hejmen, tamen, li flankenŝovis ĉion kion li studis dum la vojaĝo tra Azio, kaj ĵetis sin en polemikon pri

1 En Rask K.(2002) sur nenumeritaj paĝoj inter p.160-161 troviĝas mapo kaj tempoplano de la vojaĝo.

2 Ekzemple la fama Dan-Franca geografo Malte-Brun (1811:543) komparis la Ĉinan skribon “al tiuj sistemoj de pazigrafio pri kiuj oni tiom ridis en Eŭropo.”

3 *Man hätte vielmehr von den bekantesten Wörtern aller Nationen (z.B. Bibel, Philosophie, Rabbiner, Koran, Safran u.dergl.) ausgehen, und ihre Wurzeln zu Grunde legen sollen, alles nach den allereinfachsten Regeln zusammenfügen, etwa wie Kreolisch oder Lingua Franca, es heisst ohne eigentliche Flexion; so dass in der Materie nichts neues, in der Form nichts fremdes wäre, ...*

4 La diversajn partojn de Rask R.(1823) oni povas proksimume datumi komparante ĝian evoluantan ortografion kun tiu de Rask R.(1832), kiel resumite en Rask R.(1968:517-519).

la Dana ortografio (Rask K.2002:189-210). Tio estis gravega temo por Rask, kaj lia influo estis tia, ke praktike ĉiuj Danaj lingvistoj havis privatan ortografion ĝis ortografia reformo en 1948.

Antaŭ ol plui al la aliaj truoj de Jespersen, ni ĵetu rigardon al la abortita lingvo-projekto de Rask R.(1823), eldonita kiel Rask R.(1996). Rask hezitis ĉu nomi la lingvon “Linguáz generale” aŭ “Linguáz universale” (Rask R.1996:189-190) – la vorto “internacia” ankoraŭ ne estis vaste konata, kvankam ĝi estis formita de Jeremy Bentham jam en 1780 (Jespersen 1928b:8; 2010:8). Jen la Kristana preĝo Patronia en la projektita lingvo:

*Pater neu / ke stá n’el celo. / Sanktifikate o sé teu nomen. / O adveni teu regno, / o fí teu volentà / komo n’el celo, assì ep’ el ĝé. / O dó nei hodie neu pan koti-diane, / ed o perdona nei neu pekkates, / komo nos perdona a neu debitori. / O no enduce-ne is tentasió; / ma o libera-ne ap’ el mal / porkè el teu sé el regno / ed el potestà ed el glória / is eterne.*⁵ (Rask R.1996:142)

La plej frapa diferenco inter ĉi tiu projekto kaj Esperanto estas ke Rask uzas la Italian “ed” kie Esperanto havas la Grekan “kaj”. Cetere Rask multe zorgis pri la belsoneco: *ep’* kaj *ap’* estas mallongigoj de la prepozicioj *epi* kaj *apo*, kiuj estas prenitaj el la Greka, same kiel *is*.

Pri la verboj oni rimarkas ke Rask uzas helpverbojn anstataŭ konjugacion – la vorteto “o” signifas la u-modon en Esperanto. Rask longe havis tre kompleksan konjugacion en sia projekto, kaj nur kiam li renkontis la Portugalan kreolon de Srilanko, li enkondukis helpverbojn (Rask R.1996:161-162).

Ankaŭ Novialo, la projekto de Jespersen (2010:85-91), uzis helpverbojn, kaj oni povus supozi ke Jespersen volis kaŝi inspiron de Rask. Tamen, se Jespersen volis ion kaŝi, tio pli verŝajne estas la similecoj inter la projekto de Rask kaj Esperanto. Ekzemple la lingvo de Rask en ĉiuj stadioj uzis konsonantojn kun supersignoj – kiel vidite, eĉ en la nomo mem de la lingvo. Alia ekzemplo estas la bazaj numeraloj, kiuj en unu stadio havis la jenan formon: *un, du, tri, kvar, kvin, seks, sep, ok, nou, dek, cento, mille* (Rask R.1823:49; 1996:158).

Ke Rask okupiĝis pri planlingvo estas aparte interese ĉar li estis inter la unuaj kiuj insistis ke la lingvo estas *natura* fenomeno (Rask R.1830:377). Do, kvankam li ŝajne neniam parolis kun iu ajn pri sia planlingva projekto, laŭ li la lingvo tamen ne nepre estas *sovaĝa* fenomeno. Oni povas direkti la lingvon, se oni respektas ĝian naturon.

⁵ *Patro nia, / kiu estas en la ĉielo. / Sanktigita estu via nomo. / Alvenu via regno, / fariĝu via volo, / kiel en la ĉielo, / samtiel sur la tero. / Donu al ni hodiaŭ nian panon ĉiutagan, / kaj pardonu al ni niajn pekojn, / kiel ni pardonas al niaj ŝuldantoj. / Ne konduku nin en tenton, / sed liberigu nin el la malbono, / ĉar la via estas la regno / kaj la potenco kaj la gloro / en eternon.*

Rask ludis kun la penso eldoni la unuan broŝuron *pri la lingvo en la lingvo* mem. Sur la lasta paĝo de la manuskripto ni trovas skizon de antaŭparolo:

*Si este tentamen a formár un linguáz generale ja succede, te debi kon pake difficultà ser entendite n' este taute linguáz per lektori dokte al mín, no solemente n' Europa, ma dia tot' el orbe kristiane.*⁶ (Rask R.1996:190).

Tamen, anstataŭ la tre internacian vorton “succede” li unue uzis “reuŝír” (Rask R.1996:189), kiu estas nur Itala-Franca. Do povas ŝajni ke Rask havis Italian aŭ Francan modelon por tiu frazo.

Antaŭ ol oni inventis la elektran telegrafon, la fratoj Chappe en Francio inventis optikan telegrafon. La optika telegrafo funkcias per vico da turoj, sur kiuj oni metas balanceblajn trabojn. La diversaj pozicioj de la traboj do enkodigas iun vorton aŭ literon. La unua prova mesaĝo estis sendita inter la urboj Brûlon kaj Parcé proksimaj al le Mans la 2-an de marto 1791, kaj ĝi tekstis jene:

*Si vous réussissez, vous serez bientôt couverts de gloire.*⁷ (Anon.2)

Entute oni povas nur miri kial Jespersen diris absolute nenion pri la lingvoprojekto de Rask. La fama lingvisto Louis Hjelmslev eldonis tre multajn el liaj leteroj (Hjelmslev red.1941) kaj manuskriptoj (Rask R.1935; 1937), sed lian planlingvan projekton li menciis nur unufoje en du frazoj (Hjelmslev 1951:150-151, 157). Lia kolego Paul Diderichsen, kiu ankaŭ multe okupiĝis pri Rask, kaj kies Diderichsen (1960; 1976) estas ia respondo al Hjelmslev (1951), flankenbalais la lingvoprojekton de Rask kiel ion malpli gravan (Diderichsen 1960:84). Nur en 2002 Kirsten Rask (kiu cetere *ne* estas parenco de Rasmus Rask) eldonis Rask-biografion kun subtitolo “Grandaj pensoj en malgranda lando”, kiu traktas lian planlingvon en unu tuta subĉapitro (Rask K.2002:178-180).

2. Felix Franke (1860-1886)

La dua truo de Jespersen rilatas al lia ŝatata amiko, la germana lingvostudento Felix Franke, samaĝa kun Jespersen mem. Jespersen skribis al li, ĉar li hazarde trovis libreton de Franke pri lingvoinstruado. Tiun li trovis tiel bona, ke nun li petis permeson traduki ĝin en la Danan kaj eldoni ĝin en Kopenhago. Franke kompreneble permesis, kaj inter la du viroj sekvis intensa korespondado, ĝis Franke mortis juna pro tuberkulozo. Ili neniam renkontiĝis, sed Jespersen poste konservis tre varmajn memorojn pri li (Jespersen 1938b:38-42; 1995:47-51).

⁶ *Se ĉi tiu provo formi lingvon ĝeneralan sukcesis, ĝi devas kun malmulta malfacileco esti komprenata en ĉi tiu lingvo mem, de legantoj kleraj almenaŭ, ne sole en Eŭropo, sed tra la tuta Kristana mondo.*

⁷ *Se vi sukcesos, vi baldaŭ estos kovritaj per gloro.*

En februaro 1885 Franke sendis al Jespersen kelkajn Volapukaĵojn. Franke opiniis ke Volapuko estas stultaĵo sed ĝuste tial amuza. Jespersen konsentis, kaj por ke la afero amuzu ankaŭ aliajn, li la 5-an de Marto 1885 faris prelegon por siaj kolegoj surbaze de la alsendita materialo (Kabell & Lauridsen 2004:53-56). Tie li esprimis la kutimajn antaŭjuĝojn pri planlingvoj, kaj fine diris ke la Piĝina Angla, bazita sur natura komunika bezono, havos multe pli da ŝancoj en la mondo ol iu ajn memnomita “monda lingvo” (Jespersen 1885).

La prelego mem estas menciita en la membiografio de Jespersen (1938b:38; 1995:47), sed estas interese ke li nenie indikas kie kaj kiam li eksciis pri Volapuko aŭ Esperanto. Ke Franke estis la fonto pri Volapuko, oni eksciis nur kiam lia korespondado kun Jespersen estis publikigita de Kabell & Lauridsen (2004). Ni ankoraŭ ne scias precize kie kaj kiam Jespersen ekkonis Esperanton.

Per sia prelego, tamen, Jespersen ne nur amuzis la aŭskultantojn, sed ankaŭ establis sin kiel lokan aŭtoritaton pri planlingvoj. Tiun rolon li ŝajne prenis sufiĉe serioze, ĉar dum la sekvaj jaroj li plurfoje menciis Volapukon en siaj artikoloj (Jespersen 1888; 1890:320); Jespersen (1892:39) menciis eĉ ankaŭ Spelin, la plej faman el la projektoj por plibonigi Volapukon.⁸ Tamen nur ekkoninte Esperanton li komencis diri ke internacia planlingvo povas esti funkciigebla kaj funkciiginda.

3. Johannes Østrup (1867-1938)

Koncerne Volapukon Jespersen tiutempe multe konsentis kun sia kolego Johannes Østrup. Østrup estis studento samtempe kun Jespersen, sed krome ili ne multe interrilatis (Jespersen 1938b:30, 76; 1995⁹:37, 90). Jespersen apartenis al la admirantoj de Georg Brandes, fama tiutempa progresema literatura kritikisto. Østrup male estis konservativulo kaj skeptika al progreso. Brandes estis Judo, sed Østrup tute ne estis antisemito – male, li estis tre malferma al Judismo kaj Islamo (Østrup 1937:105-106), kaj li estis specialisto pri Islama kulturo. Tio kio malplaĉis al li, estis la ateisma tendenco inter la Kopenhagaj kleruloj, Kristanaj kaj Judaj egale (Østrup 1937:64).

Kun tiu sinteno li nature ankaŭ estis kontraŭ la ideo de planlingvo, kaj kiel 20-jara studento li publikigis la broŝuron “La malebleco de Volapuko” (Østrup 1887). Ĝi estas sufiĉe nekonata, ĉar kvankam ĝi estis lia unua presita teksto, li neniam poste menciis ĝin. En sia membiografio Jespersen mencias Østrup, sed ne lian broŝuron. *Eble* li neniam eksciis pri ĝi, sed estas malprobable.

⁸ En postaj recenzoj ankaŭ du proksimaj kolegoj de Jespersen menciis Volapukon: Pedersen (1897:113), laŭ kiu “ĉi-momente ne povas esti dubinde ke la Germana estas la lingvo plej vokita por esti la Volapuko de filologio kaj lingvistiko”, kaj Thomsen (1901:76), kiu deklaris ke “kontraste [al Latino *filius/filia*] mi ne konas lingvon krom Volapuko, kie oni povas indiki ekzemple patrinon per «ŝi-patro»”.

⁹ Vidu ankaŭ la antaŭparolon de Paul Christophersen (kunlaborinto de Jespersen) p. xiii-xiv.

Estas rimarkinde ke Østrup (1887:17) konscias ke la Volapukistoj ne intencis anstataŭigi la naciajn lingvojn per unusola monda lingvo. Male, tion Jespersen imputis al ili dekomence kaj ĝisfine (Jespersen 1885; 1905a:446-447; 1928b:4; 2010:3; 1938b:38; 1995:47). Østrup (1887:36-39) antaŭvidas ke iu speco de Angla Piĝino povus venki ĉiujn aliajn lingvojn iam en fora estonteco – kaj tiupunkte li kongruas kun Jespersen (1885). Sed tute ĉe la fino Østrup (1887:39-40) antaŭvidas ke Latino povus lingve reunuigi la sciencon en pli frua estonteco¹⁰, kaj tio estus tute nepensebla por Jespersen. Dum sia tuta vivo li pledis por la vidpunkto ke lingvo ĝenerale estas en progreso, kaj ke sekve Latino estas transpasita stadio (ekzemple Jespersen 1891:58-59, 1894:120-121, 1941:8).

4. Vilhelm Thomsen (1842-1927)

Kiel ajn, Rask estis granda truo en la membriografio, dum Franke kaj Østrup estis malpli gravaj. Sed nun ni venas al la plej granda truo en la membriografio de Jespersen, nome Vilhelm Thomsen.

La specialaĵo de Thomsen estis la Finna lingvo, sed li okupiĝis pri multaj aliaj. Ĝenerale li funde laboris pri unu temo, kaj poste transiris al io tute alia. Tiel ankaŭ pri la demando de internacia lingvo: li traktis ĝin nur en unu publikaĵo, sed ĝi estis solide ellaborita. Temas pri la traktaĵo “La komuna lingvo de scienco” Thomsen (1905a)¹¹, represita en iom alia aranĝo kiel Thomsen (1920).

La traktaĵo estas bazita sur parolado eldirita la 17-an de Aprilo 1902 okaze de la naskiĝtago de la reĝo. Thomsen estis tre estimata sciencisto, kaj precipe Jespersen admiris lin tute enorme. Alivorte, se oni povis menciiti la reĝon kaj Thomsen kune, tiutempe nenio povis esti pli grava kaj prestiĝa en Danio. ***Sed tiu ĉi parolado tute ne estas menciita en la membriografio Jespersen (1938b)***, kaj kvankam Vilhelm Thomsen estas multloke menciita en ĝi, kaj ĉie tre respektoplene, nenie li estas ligita kun la demando de internacia lingvo. Tio meritas iom detalan esploron.

La parolado de Thomsen (1905a:3-14) komence priskribas la rolon de Latino en scienco tra la jarcentoj, kaj ĝi fakte estas treege bona resumo pri tiu historio, leginda ankoraŭ hodiaŭ. Tiam Thomsen (1905a:14-20) priskribas la tiaman kaoson de naciaj lingvoj, kiuj necesigis al ĉiuj seriozaj sciencistoj de iu ajn fako lerni almenaŭ la Francan, la Germanan kaj la Anglan por povi sekvi la sciencan evoluon. Por tio li vidas tri eblajn solvojn: revivigi Latinon (Thomsen 1905a:20-21), uzi artefaritan

¹⁰ En 1936 Østrup estis vicrektoro de la universitato de Kopenhago kaj tiuofice ĉeestis la 550-jaran jubileon de la universitato de Heidelberg, Germanio. Por nek tro plaĉi, nek tro spiti al la Naziaj aŭtoritatoj li tie faris sian paroladon en Latino (Østrup 1937:252-253).

¹¹ La Finna traduko, Thomsen (1905b), havis grandan signifon por la disvastiĝo de Esperanto en Finnlando, laŭ Setälä V.(1913). – Setälä E.(1913) konsistas el paroladoj eldiritaj honore al Vilhelm Thomsen, parte longaj en la Finna, parte mallongaj en multaj aliaj lingvoj. La interligaj komentoj estas en Latino kaj ĉe la mallongaj paroladoj estas aldonitaj Esperanto-tradukoj.

lingvon (Thomsen 1905a:21-26) aŭ unuiĝi ĉirkaŭ unu el la tri ĉefaj naciaj lingvoj (Thomsen 1905a:26-28).

Konsideri revivigon de Latino Thomsen rifuzas, kun la argumento ke ĉiuokaze necesus tiom reformi ĝin, ke temos pri nova, artefarita lingvo. Tiam li priparolas Volapukon, malaprobe, kaj Esperanton – aprobe. Fine li tamen opinias ke la Angla estas la plej verŝajna kandidato de estonta internacia scienca lingvo. Tion li kuraĝas proponi ĉar la fama **Germana** klasika filologo Hermann Diels en festparolado pri Leibniz proponis la **Anglan** kiel sciencan lingvon (Diels 1899:598-99). Diels poste pledis jen por konservi ĉiujn tri lingvojn kiel sciencajn internaciajn lingvojn (Diels 1906:36-37), jen por reveno al Latino (Jespersen 1938b:152, 1995:175), sed tion Thomsen (1905a) ja ne povis antaŭvidi.

En Januaro 1904, en Germana periodaĵo pri Anglistiko, Jespersen unuafoje publike defendis la eblecon de planlingvo (Jespersen 1904:205-6, 260; 1938b:126; 1995:147). Kaj jen, rapide kreskis la afero. En la somero de 1905 li verkis por populara revuo *Tilskueren* (La observanto) artikolon titolitan “Monda lingvo”, kie la sinteno ankoraŭ estas tute tiu de Thomsen: Esperanto estas bona lingvo, sed la Angla estas pli verŝajna kaj la plej bona elekto inter la grandaj naciaj lingvoj (Jespersen 1905a). Sed jam en la revuo *Det ny Aarhundrede* (La nova jarcento) en Decembro 1905 li havas tute entuziasman raporton pri la unua Universala Kongreso de Esperanto (Jespersen 1905b). Tiu raporto estas plena de citaĵoj en Esperanto – kun ĉiuj supersignoj korekte metitaj, por la unua kaj lasta fojo en la verkaro de Otto Jespersen! Tamen ankaŭ tie li ne forgesas substreki ke lingvo eĉ pli bona ol Esperanto ankoraŭ povos aperi (Jespersen 1905b:239). La resto, kiel oni diras, estas historio: En 1907 li aliĝas al Ido (Jespersen 1937), kaj en 1928 li publikigas sian propran projekton, Novial (Jespersen 1938a; 1928b; 2010).

Do, notu la datojn: Thomsen parolas aprobe pri Esperanto en Aprilo 1902, kaj en Januaro 1904 Jespersen unuafoje skribas favore pri planlingvoj. Thomsen mortas la 12-an de Majo 1927, kaj la 20-an de Aprilo 1928 aperas la unua nacilingva mencio de Novial (Jespersen 1928a)¹². Tio apenaŭ povas esti tute hazarda, sed en sia membiografio Jespersen estas tute muta pri la rolo de Vilhelm Thomsen – kvankam ne pri Hermann Diels. Ekster la du ĉapitroj pri internacia lingvo, Jespersen (1938b:152, 1995:175) priparolas renkonton kun Diels en 1911, kie ili interalie diskutetis la ŝancojn de revivigo de Latino.¹³

12 Referenco al ĉi tiu gazeta artikolo (titolita “Ĉu nova monda lingvo pontos inter la landoj?”) mankas en la cetere tre kompleta bibliografio de Jespersen (1995:355-357). Temas pri intervjuetoj al, krom Jespersen, du Esperantistoj (d-ro Leunbach, s-ino Blicher), du favorantoj de la Angla lingvo (parlamentano Vilh. Rasmussen, aŭtoro Herman Jensen) unu neŭtrala inter ili (radiotelegrafisto J. Madsen), kaj unu ĝenerale favora al unulingvismo (aŭtorino Thit Jensen). -- La plej frua mencio de Novial estis en la Februara-Marta numero de la Ido-revuo *Mondo* (Jespersen 1995:356).

13 Diels estas menciita ankaŭ en Jespersen (1928b:7; 2010:6).

La motivo de ĉi tiu prisilentado plej kredeble estas ke Thomsen restis strikte neŭtrala inter Esperanto kaj Ido¹⁴. Por la unua numero de la Dana Ido-revuo li estis petita skribi artikolon pri Otto Jespersen (Thomsen 1911), la unuan en serio nomita “Konocata nomi” (t.e. “Konataj nomoj”). En ĝi nur la lastaj tri frazoj temas pri la planlingva agado de Jespersen. La fino tekstas jene:

*Som Medlem af den Komité, der 1907–08 skulde forhandle om den bedste Form for et saadant Hjælpesprog, havde han væsentlig Indflydelse paa det Resultat, man dér kom til, det „simplificerede Esperanto“ eller „Ido“. Men herom vil andre, der staar dette Tidsskrift nærmere end jeg, bedre kunne dømme.*¹⁵ (Thomsen 1911:12-13).

Por la presita versio de sia parolado de 1902, Thomsen (1905a:26-27) aldonis alineon. Ĝi temis pri tio ke por eviti naciajn ĵaluzon, oni povus elekti la lingvon de nacio *malgranda* kiel internacian lingvon, ekzemple la Norvegan. Kvankam la Norvega lingvo estas tre proksima al la Dana, Vilhelm Thomsen opiniis ke tia internaciigo de malgranda nacia lingvo nur detruos ĝin al la denaskaj parolantoj.¹⁶ La ideo estis proponita de la Franca fonetikisto Passy (1903a), kaj per tio ni atingas la kvinan truon de Jespersen.

5. Paul Passy (1859-1940)

Paul Passy estas traktita en la membiografio Jespersen (1938b) simile kiel Vilhelm Thomsen: plurfoje menciita, ĉiam simpatie, sed tute ne ligita al la demando pri internacia lingvo, kvankam tio estis komuna intereso de la du viroj.

La patro de Paul Passy, Frédéric Passy, estis la unua Nobelpremiito pri paco (Anon.1) – kaj Volapukisto (Spielmann 1888:26). Kiamaniere Frédéric Passy rilatis al la fiasko de Volapuko, estas nesciate, sed lia filo estis absolute konvinkita ke artefarita lingvo tute ne estas praktikebla (Passy 1887; 1888a, c, d; 1891; 1902b). Paul Passy vivtenis sin kiel instruisto de la Angla (Jespersen 1938b:42, 1995:52), kaj laŭ lia opinio oni devus simple fari ĉiujn skribojn fonetikaj, tiel ke lerni fremdan vivantan lingvon ne estos nenecese malfacile (Passy 1888b, 1913). Li ankaŭ estis granda amiko de dialektoj (Passy 1889a, 1902a).

Ekde 1886 Paul Passy redaktis la revuon *The Phonetic Teacher*, organo de la Franca asocio de instruistoj pri la Angla lingvo. Kiam la asocio fariĝis internacia kaj

¹⁴ Thomsen (1920:451) mencias Idon en aldonita piednoto, sed ne distingas ĝin el Esperanto.

¹⁵ *Kiel membro de la komitato, kiu en 1907-8 traktadis pri la plej bona formo de tia helpa lingvo, li havis konsiderindan influon al la rezulto, kiun oni tie atingis, la “simpligita Esperanto” aŭ “Ido”. Sed pri tio aliaj, pli proksimaj al ĉi tiu periodaĵo ol mi, povos pli bone juĝi.* – En la revuo estas apuda traduko en Ido.

¹⁶ Tiun opinion citas kaj aprobas Jespersen (1905a: 449). Kontraste, Jespersen (1928b:6, 11; 2010:6, 12) mencias Vilhelm Thomsen, sed ne citas lin.

ĉiulingva en 1889, la revuo ricevis la Franclingvan titolon *Le Maître Phonétique* (mf). Ĝi estis tre speciala, ĉar laŭeble ĉio estis skribita fonetike – eĉ la titolkapo! En la Franca pacifista medio oni multe diskutis pri internacia lingvo, kaj jam per Passy (1889b:40) estis menciita en mf iu obskura “Lingvo Internacia”. Thomsen kaj Jespersen dekomence estis abonantoj de mf¹⁷, kaj estas tre probable ke ili ĉi tie unuafoje eksciis pri Esperanto. Cetere Louis de Beaufront dufoje presigis en mf anoncojn pri Esperanto (Aŭgusto 1894, p.142; Januaro 1895, p.26).

Paul Passy fine konvinkiĝis ke oni tamen bezonas unu norman internacian lingvon, sed la ideo de artefarita lingvo daŭre tre malplaĉis al li. Tial li formis la *Iniciatkomitaton por la Eleko de Vivanta Internacia Lingvo* (Passy 1904). Tio kompreneble estis respondo al la *Délégation pour l’Adoption d’une Langue Auxiliaire Internationale*, la Delegacio por la alprenado de internacia helpa lingvo, formita de Louis Couturat, kiu ne konsideris naciajn lingvojn kaj dialektojn.

Sur la paĝoj de mf la debato pri elekto de internacia lingvo daŭris de Passy (1903a) ĝis Rübel (1909). Oni diskutis ne nur el kiu malgranda nacia lingvo fari internacian, sed partoprenis ankaŭ la favorantoj de granda nacia lingvo, de Esperanto kaj de aliaj planlingvoj. La Iniciatkomitato fine elektis la Italian (Passy 1907), sed kiam la delegacio de Couturat neatendite elektis alian lingvon ol Esperanton, oni simple iom post iom forgesis pri la komitato de Passy. Passy (1907) cetere konfesas ke li ne povas esti tute malkontenta pri la elekto de Ido, ĉar tio ja nur konfirmas lian negativan konvinkon pri artefaritaj lingvoj.

Jespersen kaj Thomsen ne partoprenis en la debato en mf pri internacia lingvo¹⁸. Sed iam estis propono ke oni presu la artikolojn en ortografio anstataŭ en fonetika skribo (Passy 1912:90). Jespersen (1912)¹⁹ voĉdonis por tiu propono, kaj samtempe proponis allasi artikolojn en Ido. Tamen mf plu presis siajn artikolojn fonetike ĝis 1971, kiam ĝi transformiĝis al *Journal of the International Phonetic Association*.²⁰

6. Leo Wiener (1862–1939)

La lasta truo en la membiografio de Jespersen ankaŭ estas la malplej grava. Leo Wiener ne estas menciita en Jespersen (1938b, 1995), sed li estas priparolita en Jespersen (1937), fakte jam en Jespersen (1914):

17 Plena membro-adresaro estis presita en ĉiu Januara numero. Vidu ankaŭ Jespersen (1938b:42, 1995:52). Vilhelm Thomsen estis honora membro de la asocio dekomence, Otto Jespersen ekde la jaro 1901.

18 Aliflanke, laŭ Passy (1903b) Dana abonanto de mf Erling Stensgård publikigis analizon de Passy (1903a) en la Dana gazeto *Aarhus-Posten*, kie sekvis vigla debato. Passy (1903a) ankaŭ estis tradukita de A. la Gravière por la Flandra *Vlaamse Gazet*.

19 Ankaŭ ĉi tiu referenco (temas pri nuraj kvar linioj) mankas en la bibliografio en Jespersen (1995:335-336).

20 La solaj ekzemploj de tekstoj en Esperanto kaj Ido estis specimenoj de “La norda vento kaj la suno” sur la paĝoj 139-140 de la Novembra-Decembra numero de 1913.

Jespersen kaj Wiener renkontiĝis en Usono en 1909. Wiener siatempe estis samklasano de Zamenhof en la gimnazio, kaj estis unu el tiuj kiuj kunkantis la himnon de praEsperanto en 1878. Intertempe li transmigris al Usono kaj fariĝis la unua profesoro pri Slavaj literaturoj de tiu lando. Renkontante Jespersen, li rakontis ke li nun rigardas planlingvon tute malebla kaj jam skribis plurajn artikolojn kontraŭ Esperanto. La kaŭzo, li diris, estas simple ke li iĝis 20 jarojn pli aĝa. Jespersen respondis ke ankaŭ li pliaĝiĝis kaj plisaĝiĝis dum la lastaj 20 jaroj, tamen li iris en la kontraŭan direkton. Traktinte tiun renkonton, Jespersen (1914) kontraŭdiras ĉiun argumenton de Jespersen (1885).

Jespersen ne analizis la personajn motivojn pro kiuj Leo Wiener turnis sin kontraŭ Esperanto kaj planlingvoj. Ili tamen sufiĉe klare ŝajnas rilati al la malsama situacio de Judoj en la tiamaj Rusio kaj Usono. En Rusio Juda intelektulo havus multege da karieraj malfacilaĵoj, eĉ se li parolus perfekte la Rusan. Kontraste, eĉ se la multlingvulo Wiener malbone parolus la Anglan, en Usono tio ne malhelpus lin atingi prestiĝan universitatan postenon. Se oni pene atingis sekurecon kaj sukceson, oni deziras nek perdi ilin, nek tro peni por pli.

Leo Wiener estas sufiĉe konata en la Esperanta komunumo, nelaste per nombro da artikoloj de Bernard Golden²¹, do ĉi tie ni limigu nin al la konstato ke la renkonto inter li kaj Jespersen estis raportita nur en Ida kaj Noviala tekstoj (respektive Jespersen 1914; 1937).

21 Plena bibliografio pri la artikolaro de Bernard Golden troveblas rete ĉe web.t-online.hu/goldendaniel/bibliografio_de_Bernard_Golden_v2.xls

Bibliografio

Anon.1 «Frédéric Passy - Biography».

http://www.nobelprize.org/nobel_prizes/peace/laureates/1901/passy.html.

Anon.2 «Semaphore line - Wikipedia, the free encyclopedia».

http://en.wikipedia.org/wiki/Semaphore_line.

Bjerrum, Marie. 1968. Breve til og fra Rasmus Rask : 3 : brevkomentar og håndskriftkatalog. København: Munksgaard.

Diderichsen, Paul. 1960. Rasmus Rask og den grammatiske tradition : studier over vendepunktet i sprogvidenskabens historie. Historisk-filosofiske Meddelelser / Det Kongelige Danske Videnskabernes Selskab 38, 2. København: Munksgaard.

———. 1976. Rasmus Rask und die grammatische Tradition : eine Studie über den Wendepunkt in der Sprachgeschichte. Internationale Bibliothek für allgemeine Linguistik 33. München: Fink.

Diels, Hermann. 1899. «Leibniz und das Problem der Universalsprache». Sitzungsberichte der königlich preussischen Akademie der Wissenschaften zu Berlin 1899 (32) (Juni 29): 579–603.

———. 1906. Internationale Aufgaben der Universität : Rede zur Gedächtnisfeier des Stifters der Berliner Universität König Friedrich Wilhelm III in der Aula am 3. August 1906 gehalten von Hermann Diels. Berlin: Gustav Schade.

<http://www.archive.org/stream/internationalea00dielgoog#page/n6/mode/1up>.

Hjelmslev, Louis. 1951. «Commentaires sur la vie et l'œuvre de Rasmus Rask».

Conférences de l'Institut de linguistique de l'Université de Paris (10): 143–155.

Hjelmslev, Louis, red. 1941. Breve til og fra Rasmus Rask : 1-2. København: Munksgaard.

Jespersen, Otto. 1885. «Om Volapük». Kort Udsigt over det philologisk-historiske Samfunds Virksomhed Octbr. 1884-Octbr. 1885: 88.

———. 1888. «[Recenzo de] Hugo Schuchardt, 'Auf Anlass des Volapüks' (Berlin 1888)». Verdandi, December.

———. 1890. «[Recenzo de] Lorenz Morsbach, 'Ueber den Ursprung der neuenglischen Schriftsprache' (Heilbronn 1888)». Nordisk Tidskrift for Filologi n.s. 9 (1889-1890): 320–324.

- . 1891. *Fremskridt i sproget. Studier fra Sprog- og Oldtidsforskning* 4. Kjøbenhavn: Klein. <http://www.archive.org/stream/studierfrasprog02dengoog#page/n109/mode/1up>.
- . 1892. «Gives der fremskridt i sprogene? : en antikritik». *Nor* 3. ser. 1 (1892-1893): 84–96.
- . 1894. *Progress in language : with special reference to English*. London; New York: Sonnenschein; Macmillan.
- . 1904. «[Recenzo de] Otto Will, Die tauglichkeit und die aussichten der englischen sprache als weltsprache vom standpunkte der sprachwissenschaft und sprachstatistik. (Breslauer dissertation 1903.)». *Englische Studien* (34) (Januar): 255–260.
- . 1905a. «Verdenssprog». *Tilskueren* (6) (Juni): 437–451.
- . 1905b. «Et Verdenssprog». *Det ny Aarhundrede* (12) (December): 236–239.
- . 1912. «[Avis de nos conseillers]». [*Le maître phonétique*] 27 (9-10) (September): 126.
- . 1914. «Finala diskurso». *Progreso* 7 (73) (Januar 15): 1–6.
- . 1918. *Rasmus Rask i hundredåret efter hans hovedværk*. Kjøbenhavn: Gyldendal.
- . 1928a. «Vil et nyt Verdens-Sprog slaa Bro mellem Landene?». *Klokken* 5, April 20.
- . 1928b. *Et verdenssprog : et forsøg på spørgsmålets løsning*. Kjøbenhavn: Branner.
- . 1937. «Men labore por un international lingue 1». *Novialiste* (18) (December). <http://interlanguages.net/menlab.html>.
- . 1938a. «Men labore por un international lingue 2». *Novialiste* (19) (Marts). <http://interlanguages.net/menlab2.html>.
- . 1938b. *En sprogmands levned*. Kjøbenhavn: Gyldendal.
- . 1995. *A linguist's life : an English translation of Otto Jespersen's autobiography with notes, photos and a bibliography*. Odense: Odense University Press.
- . 2010. *An international language*. 2. udg. London: feedbooks. <http://www.feedbooks.com/userbook/14934/an-international-language>.
- Kabell, Inge & Lauridsen, Hanne. 2004. *Otto Jespersen (1860-1943) og Felix Franke (1860-1886) : historien om en brevveksling*. Fund og Forskning. Copenhagen: The Royal Library. <http://www.kb.dk/kb/publikationer/fundogforskning/online/artikler/jespersenfranke.pdf>.
- Malte-Brun, Conrad. 1811. *Précis de la géographie universelle*. Paris: Buisson. <http://books.google.dk/books?id=tbQsAAAAQAAJ>.

- Passy, Paul. 1887. «[Recenzo de] J. Bauer: Sprachwissenschaftliche Kombinatorik». [The phonetic teacher] 2 (13) (Maj): 156.
- . 1888a. «[Recenzo de] J. Bauer: Spelin, allsprache auf allgemeinen grundlagen der sprachwissenschaftlichen kombinatorik aufgebaut». [The phonetic teacher] 3 (4) (April): 27.
- . 1888b. «[Recenzo de] A.M. Bell: World English, the universal language». [The phonetic teacher] 3 (6) (Juni): 45.
- . 1888c. «[Recenzo de] F. Krüger: Das Wesen und die Bedeutung der Schleyer'schen Weltsprache.» [The phonetic teacher] 3 (8-9) (August): 65.
- . 1888d. «[Recenzo de] J. Bauer: Der fortschritt der weltsprache-idee, insbesondere meines weltsprache-projektes Spelin». [The phonetic teacher] 3 (10) (Oktober): 76.
- . 1889a. «[Recenzo de] Ivar Mortenson: Fedraheimen, radikalt maalblad». [Le maître phonétique] 4 (2) (Februar): 21.
- . 1889b. «[Notes]». [Le maître phonétique] 4 (3) (Marts): 40–41.
- . 1891. «[Recenzo de] D. Rosa: Le Nov Latin, international scientific lingua super naturel bases». [Le maître phonétique] 6 (2) (Februar): 20.
- . 1902a. «[Recenzo de] G. Cleve, Die sprache in der wir geboren sind.» [Le maître phonétique] 17 (11) (November): 138.
- . 1902b. «[Recenzo de] E. A. Thoreau de Marney: Premiers pas vers la langue universelle par des signes suggestifs». [Le maître phonétique] 17 (12) (December): 150.
- . 1903a. «[La langue internationale]». [Le maître phonétique] 18 (8-9) (August): 82–85.
- . 1903b. «[Notes]». [Le maître phonétique] 18 (10) (Oktober): 109.
- . 1904. «[Comité d'Initiative pour le Choix d'une Langue Internationale Vivante]». [Le maître phonétique] 19 (2-3) (Februar): 42–44.
- . 1907. «[Langue internationale]». [Le maître phonétique] 22 (11-12) (November): 109–111.
- . 1912. «[Circulaire]». [Le maître phonétique] 27 (5-6) (Maj): 89–91.
- . 1913. «[Un moyen et un but]». [Le maître phonétique] 28 (7-8) (Juli): 92–93.
- Pedersen, Holger. 1897. «[Recenzo de] Claes Lindskog: Beiträge zur Geschichte der Satzstellung in Latein». Nordisk Tidskrift for Filologi (3. række, bd. 6) (Oktober 9): 112–113.

- Rask, Kirsten. 2002. Rasmus Rask : store tanker i et lille land. København: Gads forlag.
- Rask, Rasmus. 1816. «Wie man Russisch mit Griechischen Buchstaben schreiben kann, nebst einem Versuch über die Pasigraphie». NkS 4° 149c 42. Ny kongelige Samling.
- . 1823. «Optegnelser til en Pasigraphie». NkS 4° 149c 122. Ny kongelige Samling.
- . 1830. «En forelæsning over Sprogets Filosofi». I Udvalgte Afhandlinger : Bind 2, 373–378.
- . 1832. «Dagbog 1816-32». NkS 8° 389ek. Ny kongelige Samling.
- . 1935. Udvalgte Afhandlinger : 1-3. København: Levin & Munksgaard.
- . 1937. Ausgewählte Abhandlungen : 1-3. Kopenhagen: Levin & Munksgaard.
- . 1996. Traktatu d'un lingua² universale : II-a parto el la postlasita manuskripto «Optegnelser til en Pasigraphie» (1823). Frankfurt am Main; New York: P. Lang.
- Rübel, Rudolf. 1909. «[Die künstliche Weltsprache]». [Le maître phonétique] 24 (3-4) (Marts): 51–53.
- Setälä, Emil Nestor, red. 1913. Orationes ad Guilelmum Thomsen, virum excellentem et doctissimum, Universitatis Hauniensis professorem, hospitem Fennorum, linguis variis habitae dd. 18-23 m. Sept. Helsinki: Societas Litterariae Fennicae.
- Setälä, Vilho. 1913. «Ekscelenca profesoro. Estimataj gesinjoroj». I Setälä, E.(1913), 29–30.
- Spielmann, Sigmund. 1888. Volapük-Almanach für 1888. Leipzig: Eduard Heinrich Mayer.
http://de.wikisource.org/wiki/Volap%C3%BCk-Almanach_f%C3%BCr_1888.
- Thomsen, Vilhelm. 1901. «[Recenzo de] H. Osthoff, Vom suppletivwesen der indogermanischen Sprachen». Nordisk Tidskrift for Filologi (10) (Maj): 75–78.
- . 1905. Videnskabens Fællessprog. Bd. 14. Studier fra Sprog- og Oldtidsforskning 14 (65). København: Klein.
<http://www.archive.org/stream/aeldregraesklyr00schogoog#page/n448/mode/2up>.
- . 1911. «Otto Jespersen». Ido : dansk Verdenssprogstidende (1): 9–13.
- . 1920. «Videnskabens Fællessprog». I Samlede afhandlinger : andet bind, 427–458. København: Gyldendal.
- Zoffmann, Peter. 1916. «Rasmus Rasks Forsøg til et Verdenssprog». Esperanto-raporto 1916 (7-8).
- . 1917. «Rasmus Rask pri la mondlingvo». Germana Esperantisto (14): 126–127.
- Østrup, Johannes. 1887. Volapüks umulighed. København: P. Hauberg & Comp.

———. 1937. Erindringer. København: Hirschsprung.